

& Supren la korojn:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 246 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/laasofa mire do3re mifa so; laalala lala sola tila somi; laalala lala sofa mire do; faafafa fafa sofa mire dodo;

(#Rekantaĵe: lala lala tila so fa mi i; fafa mimi soso mimi remi fare mi; lala lala tila so fa mi i))×6)+

(&Strofoj:

'1 /Ho, kavaliroj de la nova sent' ;
Ekbruligantoj estu ni de l' koroj! ;
Flugu de kor' al kor' en homa gent' ;
Hele flamantaj festaj fajrofloroj!

(×: **Tondre paŝu, kantu forte ni ; Nia rondo en la mondo dancas plankon ĉi ; Tondre paŝu, kantu forte ni.**)

'2 Ĝemas mizere, en mallum' dronante ;
Tuta homaro sub malbona sorĉ' ; Brilu
al ili ĉie, lumdonante, ; Koro flamanta,
kiel gvida torĉ'

'3 Supren la korojn samideana rond'! ;
Montru ni ilin al disonanca mond'! ;
Ĉar en niaj koroj estas fundament' ; De
la pac', de l' ben', de l' sankta, nova
sent'.

'4 Ho kavaliroj de la Pentekost'! ; Lukti
ni devos en bataloj multaj ; Jen
malamikoj: la anima frost' ; Blinda
malam' kaj malkomprenoj stultaj.

'5 Veoj alarmas por batal' benata, ;
Grandaj mizeroj vokas nin por arm'. ;
Jen la armiloj: la laboro frata, ; Brak'
brakumanta kaj la kora varm'.

'6 Supren la korojn, samideana rond'! ;
Montru ni ilin al disonanca mond'! ;
Ĉar en niaj koroj estas fundament' ; De
la pac', de l' ben', de l' sankta, nova
sent'.)